

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Letero el Odeso

Odeso estas unu el la ĝemelaj urboj de Jokohamo, kaj nia rondo havas longan amikecan rilaton kun samideanoj en la urbo. S-ino Tamara Popova kontribuis eseon por ni, i.a. pri la lastajara UK.



Esperanto kaj mi

Mi naskiĝis en Odeso (Ukrainio). De juneco kaj ĝis hodiaŭ mia nobla aĵo Esperanto estas mia amo, religio, sorto.

Mi estas adepto de Esperanto, kaj mi «malvestas ĉapelon» antaŭ ĝia kreinto L. Zamenhof, unusola en

Ukrainio monumento al li, kiu troviĝas en korto de la domo N-ro 3 en strato Deribasovskaja (Foto -1).

Fundamenta celo de L.Zamenhof: «...doni al homoj simplan kaj neŭtralan ilon por internacia komunikado» konservas sian aktualecon kaj nuntempe.

Mi partoprenis multajn Esperanto-aranĝojn en diferencaj landoj de la mondo. En 1992 mi vizitis Jokohamon kaj Tokion. En 1998 mi kun miaj geklubanoj organizis 71-an SAT-kongreson en Odeso. Sed neniam mi partoprenis UEA-Kongresojn.

Mia hobbio

Tamara Popova (Odeso, Ukrainio)

Karavano al Lillo

Partopreni Jubilean 100-an UEA-Kongreson estis mia arda revo. Mi fariĝis anino de ukrainia delegacio, por kiu estis gravege prezenti nian Landon kaj Asocion en internacia nivelo. Longtempe oni konservis monon, oni pridiskutis konsiston de delegacio, oni elektis la plej malmultekostan vojon.

Finfine, ni estis en Francio! En urbo Lillo, apud tiu loko, kie okazis la Unua Kongreso.

Ni estis 12 maturuloj kaj 8 infanoj (Foto-2), kiuj samtempe partoprenis 44-an Internacian Infanan Kongreseton. La plej aĝa odesanino





3 havas - 80! La plej juna ukrainino havas 7 jarojn!

Delegacion, kiun enhavis profesoroj, studentoj kaj lernantoj, gvidis la prezidanto de Ukraina Esperanto-Asocio, Eŭgeno Kovtonjuk, kiu estas fama vojaĝanto kaj fotopentristo (Foto-3).

Ni vivis en Lillo

Spertaj esperantistoj partoprenis multajn Esperanto-kongresojn, sed en Lillo nin agrable mirigis

bonega organizado de la Kongreso kaj franca gastameco.

Kongreso okazis en Granda Lilla Palaco. Ĉi tio estas moderna 13-etaĝa konstruaĵo kun multaj diferencaj haloj kaj aŭditorioj. En ĝi facile ĉeestis multe da kongresantoj. Liftoj, eskalatoroj, bufedoj, libroservo sen vendistoj funkciis bonege. Antaŭpripensita organizado de akcepto kaj de loĝiĝo de preskaŭ 3000 diferenclingvaj partoprenantoj min simple mirigis!

Al ĉiu gasto oni enmanigis kovertojn kun ŝlosilo de ĉambro en hotelo aŭ studenta loĝejo, talonojn por manĝado en malproksima restoracio, semajnajn metroajn biletojn, invitilojn por diferencaj aranĝoj kaj menditaj ekskursoj. En Kongresa sako troviĝis Kongresa Libro, mapo de Lillo kaj aliaj gravaj materialoj. Kongresa Programo estis ege abunda. Absolute maleble estis partopreni en ĉiuj prelegoj, ekspozicioj, didaktikaj ludoj, ekskursoj, koncertoj, komunikadoj kun multnombraj malnovaj kaj novaj gesamideanoj.

Ĉiu tago komenciĝis de legado de kongresa ĵurnalo. Sur la pordoj de multnombraj aŭditorioj ĉiam oni pendigis tagordon, kio plenumis kun precizo ĝis unu minuto. Prelegis famaj sciencistoj kaj instruistoj de Esperanto. Kvanto de originalaj lernaj metodikoj mirigis min. Programo enŝaltis nur la plej talentajn el ili, kongresantoj partoprenis gajajn didaktikajn

ludojn, kiuj helpis konatiĝi kun kolegoj de diferencaj aĝoj kaj memoriĝi malofte uzatajn vortojn. En Scienca Kafejo aktive funkciis la SAN-Marina Universitato. Tie oni temis pri aktualaj prelegoj el rekorda Scienca Programo.

En la dua duono de tago estis la tempo de talentaj naciaj muzikistoj, dancistoj, poetoj. Tre kortuŝe okazis natura intereso de kongresantoj al nia lando, kiu troviĝas en stato de neanoncita milito. Multaj el ili aĉetis en Libroservo la libron de T. Ŝevĉenko.

Sed la plej neforgeseblan impreson lasis je 300 kongrespartoprenantoj bonege organizita busa ekskurso en Bulonjo-ĉe-Marco (Norda Francio). En urba teatro same, kiel kaj en 1905-a jaro, atentege estis aŭdita fama parolado de Esperanto-kreinto L. Zamenhof. En la sceno sidis lia 90-jaraĝa nepo Louis Christoph Zaleski-Zamenhof. Li subtenas la ideon de la avo. La stratoj de Bulonjo-ĉe-Marco en 1905 neniam vidis tiom gajajn homojn de diferencaj aĝoj, kiuj portis originalajn flagojn kaj afiŝtabulon kun Esperanto-simbolo. Sur la turo de la urbodomo pendis la standardo de Esperanto (Foto-4).

Hejme

Kiam mi revenis hejmen, mi dividis kun odesanoj miajn neforgeseblajn rememorojn en Domo de Sciencistoj, en Hebrea Kultura Centro «Ĥesedo», en Medicina Klubo.

Rezulte - en odesa Esperanto-klubo «Blanka Akacio» komencis funkcii 2-monata Esperanta kurso.



TIEL OKAZIS

La 2-a ĝenerala kunsido (por 2016)

jan. 31, 14h00-17h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

Oni fiksas la agado- kaj kasraporton por 2015, agadoplanon kaj buĝeton por 2016, kaj decidis, ke la estraranoj lastjaraj daŭre restu en 2016. Ĉeestis 16 membroj efektive, kaj kun mandatoj, pli ol duono de la membraro estis reprezentita.

Poste oni aŭskultis prelegon de s-ino Doi Ĉieko pri la bedaŭrata s-ro Kubo Sadaĵiroo, iama prezidanto de Japana Esperanto-Instituto, fama beletro-kritikisto, kun bildoj de lia memordomo en Mooka, lia loĝloko.

Prelego en Jokohama Internacia Forumo

feb. 7, 11h00-12h50, ĉe JICA-domo en Jokohamo

Al 15 ĉeestintoj, nia triopo prezentis Esperanton: s-ro Fuse Kentaro pri la ideo de internacia lingvo celita de Zamenhof, s-ino Miyazaki Hideko pri Esperanta movado, kaj s-ro Nanba Fumiharu enkondukis en la lingvon mem. Helpis Doi Hirokaz.

NIAJ PLANOJ

Hama-Ronda Vespero en februaro

feb. 20, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

Pri Nitro en Slovakio, la urbo de la 101-a Universala Kongreso

102-a Legokunsido

mar. 5, 13h00-15h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

“Mara stelo” de Julian Modest

Foiro de Civitanaj Agadoj

mar. 12 kaj 13, ĉiu 10h00-16h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

Civitanaj grupoj uzantaj la supran lokon kunvenas kaj ekspozicias pri sia agado.

Hama-Ronda Vespero en marto

mar. 19, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

“Polenoj sub tero rakontas”

parolanto: Kijonaga Ĵoota



Niaj Klasoj kaj Kursoj

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa)

*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso Esenco por legi “Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia”/(2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj” / (3) Daŭriga kurso 2, lernado per “Hanako”/ (4) Daŭriga kurso 1, tagoj nefiksitaj, lernado per “Hanako”

*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Oni legas “La Zamenhof-Strato” de Roman Dobrzyński./ (2) Daŭriga kurso: legata libro estas “Karlo”.

Venis retletero!

de s-ro Ji Yin'geng (el Ŝanhajo, Ĉinio) al ges-roj Sibayama, liaj multjaraj geamikoj

Karaj geamikoj,

Hodiaŭ ni revenis de la centro de la urbo kaj mi ricevis numeron 311 de la revuo “Novaĵoj Tamtamas”. La revuo estas bela, enhavoriĉa kaj altkvalita. Ĝin mi tre ŝatas. Elkoran dankegon al vi ambaŭ. Ĉion bonan al vi ambaŭ. Saluton al via patro.



JI Yin'geng

La ĝemelaj urboj de Jokohamo

La urbo Jokohamo kiel municipo havas oficialajn ĝemelajn aŭ amikajn rilatojn kun jenaj 8 urboj tra la mondo. Ni konas esperantistojn en 3 urboj el ili.

Konstanco (Rumanio)
Liono (Francio)
Manilo (Filipinoj)
Mumbajo (Barato = Hindio)
Odeso (Ukrainio)
San-Diego (Usono)
Ŝanhajo (Ĉinio)
Vankuvero (Kanado)

Opinio

KOYAMA Takesi

La 8-a de decembro — la grava tago neforgesenda —

Kia tago estas la 8-a de decembro?

Hodiaŭ estas tia tago – vidu malsupre –, sed neniu menciis publike pri ĝi en TV kaj ĵurnalo. Kial ?

Ĝi estas netuŝebla tago, kiun oni ne volas rememori, mi pensas. Ankaŭ mi fogesis ĝin ĝis la jarfina bankedo de la rondo en Acugi pri la 9-a artikolo de la japana konstitucio.

Ĝi estis la tago, en kiu Japanio deklaris militon kontraŭ Usono en 1941 kaj la dua mondmilito por Japanio komenciĝis. Tiam Japana mararmeo surprizatakis usonarmean bazon en Perl-haveno kaj la terarmeo tuj surlandiĝis al Malaja Duoninsulo en angla teritorio. Mi tiam estis en la 3-a lernoĵaro en elementa lernejo kaj post kelkaj tagoj ni, lernantoj procesiis kun papera sunflago memfarita en vilaĝeto kantante militkanton. Ĝi estis la procesio pro venko en Malaja Duoninsulo. Ne ridaĉu, tio estis grava sperto de tiama vilaĝa knabo for de urbo. Ankaŭ plenaĝuloj serioze bonvenigis la paperprocesion de geknaboj.

Sed Japanio estis komplete venkita de usona armeo post ĉirkaŭ 3 jaroj kaj duono en 1945. Tial Japanio kapitulacis senkondiĉe kaj Usono okupadis Japanion. Japana reĝimo kun armeo tute nuliĝis, kaj la nova konstitucio estis farita laŭ la usona okupado. Ĝi estas la plej valora juro por paco; forĵeti armeon, rezigni militon. La fundamenta ideo prezentas ideale en la 9-a artikolo de la japana konstitucio. Sed lastatempe kelkaj diras senhezite ke oni volas havi monon pli ol pacon, la ĉefministro Abe kaj liaj flatuloj komencis produkti armilojn kaj kolportis ilin eksterlanden.

Tial li ne volas publikigi la tagon de la milito inter Japanio kaj Usono. Pro tio TV kaj ĵurnalo ne menciis pri la 8-a de decembro.

70 jarojn poste, ĉi-jare estas granda ŝanĝa punkto por japano, mi pensas.

(decembro 2015)

Kiun opinion vi aprobas? — imperiestro kaj ĉefministro —

Lastatempe leginte la libron “La imperiestro Akihito kaj pacismo” mi profunde kortuŝiĝis de tio, ke la imperiestro grave konsentas la Japanan Konstitucion kaj kutime kondukis/as laŭ la kadro de ĝi. Male la ĉefministro Abe pensas senkonsidere kaj agadis/as egoisme.

Post la malvenko de la Pacifika Milito Japanio akceptis demokration kaj paŝis sur la vojo de paclando. La imperiestra moŝto diris, ke realigi demokration estas sendube ĝusta vojo. Sed la registaro ne volas konservi la Konstitucion de land-fundamento, kaj laŭplaĉe interpretante ĝin Abe ekpaŝis sur la militvojon kun la akompanantoj de militindustria grupo, kiu dezirus tujan profiton pli gravan ol pacon.

Krome dirante eliron el la postmilita reĝimo, Abe malaprobas eĉ packonstitucion faritan de antaŭuloj por restari trans malvenko de la Pacifika Milito. Ankoraŭ nun konflikto aŭ milito en diversaj landoj en la mondo bedaŭrinde daŭras, sed Japanio tute ne partoprenis/as en la konfliktoj kaj milito dum 70 jaroj de post la militofino en 1945, ĉar la 9a artikolo de la konstitucio, kiu rezignas por ĉiam militon, profunde enpenetris/as en la koro de multe da japanoj.

Ĉu multaj japanoj scias la malkonkordon pri la pensoj de la imperiestro Akihito kaj ĉefministro Abe? Eĉ se sciigi la informon estas ne taŭge por la Abe-grupo, oni devas publikigi ĝin laŭ la principo de informopubliko. Mi pensas tiel.

(januaro 2016)

